# CONCORDE

## NICA STELO

NICE - ESPERANTO - COTE D'AZUR

Abonprezo : 2 F
Subtenabono : 5 F

Organe Culturel

*Direktoro :*
**Hubert FEREZ**
7, Avenue de Reims
NICE (Francujo)

**C. C. Postal TOULOUSE 632.15**

**TRIMESTRIEL**

N° 13 - Mars 1967


POR PROPAGANDO EN LA POREUROPAJ MEDIOJ

(Laù propono de nia amiko, Komitatano R. FROEHLICH, ni presigis la ĉi suban propagandilon, kiun ni konsilas meti, kune kun la dokumento pri la lingvo mem, en la aùtomobilojn portantajn la siglon "EU".)

-:-

POUR UNE EUROPE UNIE

L'arrière de votre voiture porte le sigle "EU". C'est dire clairement que, comme nous, vous désirez une Europe unie, en attendant un monde uni. Mais l'Europe ne se fera pas si on en laisse uniquement le soin aux fonctionnaires et aux parlementaires. Il faut pour la constuire, l'action tenace de tous les hommes de bonne volonté et, pour ce faire, il faut que ces hommes s'entendent, qu'ils se comprennent qu'ils pratiquent une langue commune.

Or, il est évident qu'une seule langue répond à cette nécessité : l'Esperanto! langue neutre, logique, très facile à apprendre, dotée déjà d'une riche littérature, parlée actuellement par plus de 10 millions d'hommes des cinq continents (dernière statistique de l'UNESCO.)

Quand vous la parlerez, elle vous permettra d'avoir des correspondants dans le monde entier vous facilitant voyages, transactions, échanges culturels, commerciaux etc ... et sur un pied de réelle égalité avec vos interlocuteurs !

Vous contribuerez ainsi, peu à peu, à la naissance et à l'organisation de la grande communauté européenne.

Les documents ci-joints, édités par notre Comité, vous indiquent comment suivre, presque sans frais, l'enseignement de cette langue mondiale. Ecrivez (en joignant une enveloppe timbrée pour la réponse) à notre Centre d'Etudes : "COMITE CONCORDE", 7, Avenue de Reims. 06.- NICE.

--------

(Tiun alvokon, kun akompanonta dokumento pri la lingvo mem, vi povos mendi al Hubert FEREZ, 7, Avenue de Reims, NICE ; C.C.P. 632.15 TOULOUSE - Prix : 10 frs les 100)

-----

KOMUNIKAĴOJ

1.- Ni petegas la sekretariojn de la grupoj kaj la unuopajn personojn sendi al ni siajn artikolojn kaj komunikaĵojn ne manskribitaj, sed nepre tajpitaj. Dankon.

2.- Mi informas la geamikojn ke, pro la ordona neceso de nia de tago al tago ampleksiĝanta agado, mi instaligis hejme la telefonon. Jen la numero : 84.19.07.

H.F.

-----------

VIVO DE LA G R U P O J

CANNES.-
Dank'al la impulso donita de la pioniro de nia movado en tiu urbo. Sro.TRIOU, kaj al la sindonema kunlaboro de Samideanoj GILLES kaj FONTANA, la entuziasmplena kaj nelaceble. Delegito Sro LANZO, malfermiĝis kurso vizitata de Cirkaù 15 gelernantoj. La 13an de marto, Sro .FROEHLICH kaj H. FEREZ vizitis la kurson kaj kun ĝojo konstatis ke la plej kontentiga etoso regas en tiu kurso en kiu la gelernantoj sutdas kun entuziasmo, kun seriozeco kaj kun senduba profito.

G A P.- La 4an de decembro la jarkunveno de la Grupo okasis en la salono de la turismoficejo. Ceestis 12 membroj. Interalie estis decidite mendi 10 pliajn staci-diskojn por aùtomobilij kaj pagi 10 kolektivajn jarabonojn al la regiona esperanto gazeto "CONCORDE". Krome la grupo eble entreprenos en printempo la eldonadon de afiŝetoj sur lum eska papero, kiun ĝi planas jam de longa tempo. Se iuj legantoj havas mallongan sloganon aù trafan esprimon por presigi, nepre ili tion konigu al nia grupo kiel eble plej frue. Roger COLNEY (P.T.T. Esperanto-Delegito), 05 GAP.

GOLFE JUAN.- La Délégito Sro LANZO malfermis kurson, kiu nun bone prosperas.

MOUGINS.- Sro LANZO ĵus kreis kurson kiun li mem gvidas.

N I C E.- Dank' al nia amiko Sro R. FIQUET, Honorprezidanto de la Esperanto Grupo de NICE estiĝos grava kunlaborado inter Rotario kaj Esperanto, okase de la tutmonda Konvencio de Rotario Internacia, kiu kunsidos en Nice dum Majo 1967 kaj kiu arigos pli ol 20.000 da partoprenantoj.
Sro Fiquet, kiu okupiĝas pri la Esperanto-Fako de Rotario en Nico donis la ĉi-subajn unuajn informojn :
Programo - Dum Majo 1967 -
Lundon 22an postagmeze - Laborkunsido por la Rotarianoj.
Mardon 23an posttagmeze - kun la lokaj Esperantistoj : Vizito de la Urbo.
Vespere = Komuna manĝo
Akcepto fare de la Esperanto-Grupo de Nice
Merkredon 24an posttagmeze - Kun la lokaj Esperantistoj, ekskurso al Monaco - Akcepto fare de la Esperanto Grupo de Monaco.
Jaùdon 25an posttagmeze - Laborkunsido de la Rotarianoj
Laù tiu programo devas esti organizitaj,
De la Nicanoj : a) Viziton de la urbo
b) Kominan manĝon kaj distran vesperon en Nice.
c) Ekskurson al Monako.
De la Monakanoj d) Akcepton en Monako.

Krom tio, organizo :

e) en la Kazino, de la "Hejmo de Amikeco", kie estos ĉiuj informservoj.
f) en Palaco de Ekspozicioj, organizo kaj deĵoro en la Esperanto-Stando, por akcepto de la Rotarianoj Esperantistaj kaj de iliaj samfamilianoj kaj helpo al ili en ĉiuj cirkonstancoj : rilatoj kun ĉiuj oficialaj servoj kaj informoj ĉe ili, butikumado en la urbo, k.t.p.

SOLLIES PONT.- "Amicale des Parents d'Elèves des Cours d'Esperanto du Canton de Soliès-Pont (Var). Kial ĝi ?.- Asocio de gepatroj de lernantoj de publikaj lernejoj", tion oui komprenas, tio estas utila. Sed "Amicale des Parents d'Elèves des cours d'Esperanto"... Kial ? Mi respondas :

Jen la historia de la nia,

1963/64 - Estis nenia esperantista vivo en la kantono de Solliès-Pont. De post 1957 ni loĝis tie. Ni renkontis nur du aŭ tri gemaljunulojn kiuj ne plu aktivis. Komence de Oktobro ni aranĝis ekspozicion en la urbdomo de "La Farlède". Gin vizitis kelkaj esperantistoj el Hyères la urbestro kaj la lernejestro, sed neniu el la euloĝantaro. Tamen suficis. Interkonsentite kun la lernejestro, post paroladeto farita al la gelernantoj de la klaso de la direktori 15 geknaboj sin enskribis por sekvi kurson, 12 daŭris la lernadon ĝisfine. Dum la lerneja jaro ni partoprenis kun la infanoj, la federacian kongreson en Nico. La voyaĝon de la infanoj, pagis la kultura Centro de Hyères, kiu nin pelpis tinjare. Plie la arbestraro pagis la librojn kaj la kajerojn necesaj.
1964/65.- Dua jaro - du kursoj - unu en La Farlède por Komencantoj - unu en Solliès Pont por la Naturamika grupo. En la Farlède sin enskribi 17 geknaboj - Lernis ĝisfine 13. Ce la Naturamikoj sin enskribi 7 restis gis fine 4. Dum majo ni vizitis la federacian kongreson en Gap, kaj en Julio ni organizis infavojaĝon al la Naturamika Domo "Kriensereg", apud Luzern, sur la Pilatus Monto je 1000 m. altea. Ceestis la voyaĝon 10 geknaboj. Tiu svisa voyaĝo estis nia unua sukceso. La Kongresan ekskurson kaj la somervojaĝon pagis la partoprenintoj, sed je tre malalta prezo.-
1965/66.- Dum tiu jaro ni starigis la "Amicale" kies prezidanto fariĝis Sro FAURY, patro de lernanto. Nun la konsilantaro de la asocio prizorgos la administrajn aferojn Okazis tri kursoj - du en La Farlède, unu en Solliès-Pont : duagrada. La "Amicale" ankaŭ organizis : 1° - la federacian kongroson en Solliès Toucas kaj ties posttagmezajn distrojn. 2° - Ekskurson senpagan por la infanoj : Avignon, Fontaine de Vaucluse.- 3° - Someran infanvojaĝon al la "dua konferenco de la lernejoj en kiuj oni instruas esperanton". Partoprenis 15 geknaboj, je restadprezo tre malalta. Nia korespondanto, profesoro Wesian en Graz, prizorgis por ni komfortan restadon en studenta hejmo - Ankoraŭ bona propaganda sukceso. Dum la restado, niaj geknaboj renkontiĝis kun 60 diversnaciaj geknaboj samaĝaj, el Jougoslavio, Italio, Germanio Austrio, Usono.
1966/67.- 4 kursoj - du en La Farlède - du en Solliès Pont. La unuagradan en Solliès Pont gvidas novbakita instruisto la aliajn mi mem. Sin enskribis 51 gelernantoj. Restas nun 44 kiuj certe lernos ĝis fine. Inter ili : 26 novajn gelernantojn 9 ĝis 13 jaraj, 3 patrinojn de lernantoj (novaj lernantinoj) kaj 15 malnovajn gelernantojn, geknaboj de 12 ĝis 16 jaraj. Estas antaŭvidata ekskurso al la federacia Kongreso kaj vojaĝo al Jougoslavio.

La infanoj nenion pagas pro lernado. Plie ni pagas la librojn (la urbestraro donas la kajerojn), la ekskurson, kaj donos iom da mono por pagi parton de la voyaĝo al la sukcesontoj por la atesto pri lernado. Ni aliĝis al "Grajnoj en Vento" de Sro Erbetta en Bien (Svisio) - NUN NI ESTAS SUBVENCIATAJ.-

Sed estas ankoraŭ organiza periodo, ni semas ! Rikolto ŝajne okazos en 67/68 kaj pli poste ; jam 3 patrinoj lernas.Geknaboj fariĝas gejunuloj.- Ni antauvidas en la sino de la "Amicale" : Kulturan Centron de Esperanto. Kiam ? 1968 eble, 1969 certe. Jen la celo, kaj la kialo !

A. MATHIS

Se vi volas starigi kulturan Centron de Esperanto, sekou tiun vojon - Vi certe Sukcesos.

TOULON.- Brila prelego de Sro Marcel JULLIEN, la sindonema Prezidanto de la Provenca Esp. Federacio.

VALLAURIS.- Sub la prezidanteco de la Vic-Urbestro (kiu anstataŭ is Sron DERIGON, urbestro kaj efektiva Esperantisto, parolanta bone la lingvon !) okazis la inaŭguro de la nova Esp. Grupo, nomita "Verda Stelo". La vic-urbestro substrekis la altan valoron de nia mond lingvo kaj anoncis la ĝemeligon de Vallauris kun urbo el Mezeŭropo per Esperanto ! Hubert FEREZ respondis en la nomo de la Komitato "Concorde" same kiel en la nomo de siaj ĉeestintaj sindonemaj kun laborantoj : Fino M.L. COMINO, Sino G. COLEAU, Sino LUQUET, Sro FROEHLICH, Sro PAZZINI kaj Sro POMEROL. Li dankegis la urbestron kaj la tutan urban Konsilantaron kaj emfazis la altan signifon kaj utilecon de la decidita ĝemeligo per Esperanto. Li poste gratulis Finon Léa ESPITALIER "kiu neniam ĉesis alte svingi la torĉon de Esperanto en Vallauris" kaj Sron LANZO kiu inciatis starigi kurson en la urbo - kurso kies li mem estas profesoro. De nun la loka Komitato konsistas el : Honorprezidanto : Sro DERIGON, Urbestro - Prezidanto : Sro Pierre CORNET - Sekretariino : Fino Simone BONNET - Kasistino - Fino Léa ESPITALIER. La kunveno finiĝis per alparolo de Sro TRIOU, Prezidanto de la Komitato en CANNES, kiu krome lerte recitis Esperantan poemon verkitan de nia amikino , Fino Espitalier.

-:-:-:-:-:-

## H U M O R O

Azenoj : En la zoologia ĝardeno antaŭ la azenoj :
Knabo : paĉjo, ĉu ankaŭ azenoj geedziĝas ?
Patro : nur azenoj ....... mia filo !!!

La "forta" sekso.

A - Aŭskultu, amiko mia, kiel mia edzino, hodiaŭ matene, min traktis !
Si ĵetis la kafkruĉon sur mian kapon ! Cu via edzino same agas ? ....
B - Ho ! neniam ..... ni trinkas nur teon.

"Li mem faras" !

Pastro = (al knabo kiu venas malfrue al la katekisma leciono)
Kial ci malfruas ?

La (moderna) knabo = Tial ke patrino mia ĵus akuŝis bebon.

La pastro = ... Kiel ? Akuŝi bebon ? Ho ! kia ŝokiga esprimo ! Diru, pereksemple : paĉjo aĉetis al mi etan fraton !

La knabo = Ho ! ne pastra moŝto, mia patro ne estas riĉa ; li ne povas aĉeti bebon, li mem faras !

-----
---
-

## Letero de Sro Paride VALLA

Nia Samideano Paride Valla, el Cagnes sur mer, post restado en Italujo, skribis al ni leteron per kiu li deziras substreki la fervoron por Esperanto de niaj italaj gesamideanoj.

Jen eltiraĵo de tiu letero :

"Miaj amokoj esperantistaj faris por mi kiel eble plej multon. Multe da fojoj ili akompanis min dum miaj rondiradoj. Mi partoprenis al la inaaùguro de la strato "Esperanto" en AGAZZANO (provinco Piacenza). La muziko de la urbeto ludis nian himnon "La Espero". Monaño diris la meson en Esperanto - nune permesita de la Papo - kaj kun la aùtoritatoj de la urbo ni faris bankedon kiun partoprenis pli ol 100 personoj. Ni ankaù iris al la urbo ASTI kie oni festis la lernantojn kaj disdonis atestojn. Sekvis bankedo kun ĉirkaù 200 gastoj.

Mi partoprenis la italan Esperanto-Kongreson ĉe Marina di Carrara (Toskano) kiu estis plensukcesa. La Itala Registraro estis reprezentata per la Ministro AMIDEI. Ĉeestis multe da gesamideanoj. Mi alportis al tiu Kongreso la saluton de la Nica esperantistaro."

-:-:-:-